



**FLANDRA  
ESPERANTISTO**  
MONATA REVUO  
ORGANO DE LA FLANDRA  
**ESPERANTO  
MOVADO**

**ENHAVO:**

La Juĝo de Versajlo. — Esperanto kaj Pacifismo. — Gratuloj. — Kiun lingvon paroladis Nia Sinjoro Jesu-Kristo? Eden-Hejmo. — Simila al ĉerizo. — Vortfarado kaj popola Edukado. — Perfiduloj. — Inter ni. — Al Arnhem. — Avino. — Gaja maro. — Historio de Pluvombrelo. — Subteno por nia revuo. — Esperanto door zelfonderricht; 2<sup>e</sup> Les. — Bibliografio. — Diversaĵoj.

**JARA ABONPREZO : 10 frankoj. — Eksterlando : 3 belgoj.**

# FLANDRA ESPERANTISTO

Organo de la Flandra Esperanto - Movado

APERAS ĈIUMONATE.

Redaktoro kaj Administranto :

JAN VAN SCHOOR

Julius De Geyterstraat, 149/1, Antwerpen.



Jara abonprezo : 10 frankoj. — Eksterlando : 3 belgoj.

Poŝtĉeko : 1735.09

## Mondpolitiko

### LA JUĜO DE VERSAJLO.

„La interligitaj kaj asociintaj registaroj deklaras kaj Germanujo rekonas, ke Germanujo kaj ĝiaj konfederacioj kiel kaŭzintoj estas respondecaj pri ĉiuj perdoj kaj domaĝo, kiujn la interligitaj kaj asociintaj registaroj kaj iliaj ŝtatoj estas suferintaj de la milito, kiu estis altrudita al ili per la atako de Germanujo kaj ĝiaj konfederacioj”.

Tiel diras artikolo 231 de la packontrakto, kontraŭ kiu speciale, okaze de la memorado de la antaŭ dek jaroj okazinta „diktato” de Versajlo, la Germanoj manifestaciis en Berlino.

Dum tiuj dek jaroj multo estis publikigata, kio ĵetas klaran lumon sur la antaŭmilitajn okazintaĵojn.

Estas antaŭ ĉio la kvardek dikaj foliaroj en kvindekda libro de la „Auswärtige Amt” en Berlino, giganta informeldono, tiel grava, ke francaj historiistoj kiel la profesoroj Aulard el Parizo kaj Vermeil el Strasburgo, senkaŝe rekonis ilian valoron kaj pretigis la francan tradukon. Malmultaj eble tute faros la interesan legadon de tiu impona kolekto, sed kiu, sen tio, parolos pri la historio de 1870 ĝis 1914, faros tion kiel blindulo pri koloroj.

Ekzistas due la same interesa, kvankam ne tiel detala eldonaĵo de la anglaj diplomaciaj dokumentoj de la Foreign Office-la „British Documents on the origins of the war” — kiun Mac Donald dum sia unua ministreco prizorgigis al sinjoroj Dr. Temperley kaj Dr. Gooch, ĉi tiu lasta mondfama historiisto —, kaj de kiuj nun ses volumoj estas aperintaj. La tuta kolekto konsistas el dekunu volumoj, pli malmulte ol la germana, kio estas komprenebla, ĉar Anglujo fine nur eliris el sia izolpolitiko je l'komenco de la dudeka jarcento.

Krom tio estas multaj memoraĵoj de diplomatoj kaj militistoj — Poincaré kun siaj je l'unua rango — kaj kiuj nun tre kritike povas kaj devas esti legataj kun la helpo de la diplomaciaj dokumentoj.

Kiam oni trafolias tiun literaturon — kaj ĝi estas pli interesa ol iu romano — oni jam povas provizore konstati: la tezo de artikolo 231 de Versajlo povas eble havi politikan valoron, science ĝi estas pura sensencaĵo.

Ne estas per manifestadoj, ke ĉi tio fine klariĝos antaŭ la mondkonscio, kaj la Germanoj fakte pli bone agus fidante la sciancan laboron por montri, ke 1914 estis granda tragedio, je kiu Germanujo estis kulpa, sed multaj aliaj grandaj ŝtatoj estis same culpaj.



### Herman Vos

*Flandra-nacionalista parlamentano.*

*Membro de la estinta Konsilantaro de Flandrujo, ĉefredaktisto de la ĵurnalo „De Schelde” kaj redaktinto de nia nuna ĉefartikolo.*

Malgraŭ ĉiuj stultaĵoj de la ŝovinistaj demagogoj, eĉ malgraŭ la lamaj klarigoj de iu departemento de Eksterlandaj Aferoj ĉi tie aŭ tie, tiu scienca laboro estas daŭrigata de ĉiuj kleruloj, Francoj ne malpli ol Angloj aŭ Germanoj aŭ Italoj, kaj ĝi fine estos farinta pli por la klarigo de l'spirito kaj la repaciĝo de l'koroj, ol cent stratmanifestacioj aŭ mil manifestoj.

Ciuj demokratoj, por ke la laboro de la kleruloj estu kiel eble plej perfekta, devus postuli, ke la diplomatiaĵoj de la departementoj de Eksterlandaj Aferoj en tiuj landoj, kie tio povas utili por la koncerna pristudo de la deveno de la mondmilito, estus eldonotaj. Belgujo precipe ne povus tiurilate postresti, ĉar la komunikoj de ĝiaj diplomatoj en la eksterlando devas esti multokaze plenvaloraj por la historia scienco.

Ĝus antaŭ la deka datreveno de Versajlo von Wegerer, Germana specialisto en tio kion oni nomas la „Kriegsschuldfrage“, estas kolektinta en libreto la opiniojn de eminentuloj el la eksterlando, diplomatoj kaj kleruloj, kiuj malaprobas la tezon de artikolo 231. Estas jam tre impona listeto. (\*)

La plej granda konvinkforto ja eliras de la historiverkistoj, kiuj konvinkiĝis per senpartia fontstudo : la Amerikanoj Barnes, Burgess, Fey, Seymoor; la Angloj Beazley, Lowes Dickonson, Gooch; la Franco Fabre-Luce; kvankam la opinio de ŝtatistoj kiel Coolidge, Lloyd George, Mac Donald, Lord Parmoor, Ponsonby, ankaŭ estas tre grava.

Prof. Harry Elmer Barnes formulas ĝin kiel sciencaĵon.

„Devas esti klare por ĉiuj, kiuj ĝis nun sekvis la analizon de la pruvoj pri la demando de la militkulpulo, ke la propekakapra teorio (the scapegoat theory) de la tuta, ekskluziva kaj sola prirespondeco de Germanujo ne pli longe povas esti subtenata”.

Profesoro Gooch, la eminenta specialisto diras la samon alimaniere :

„Neniu pruvo estas ja aperinta, kiu pruvus ke la Germana registaro aŭ la Germana popolo deziris aŭ komplotis la mondmiliton. Same antaŭ kiel post la murdo de la ĉefduko la intencoj de la Wilhelmstrasse estis tiel pacemaj kiel ĝia politiko estis mallerta”.

Estas preskaŭ kion skribis la Francoj Fabre-Luce kaj Prof. Renouvin de la Sorbonne, ĉi tiu en sia konata libro pri la tujaj militkaŭzoj.

Malgraŭ tio, la duonoficiala parolilo de la Quai d'Orsay, „Le Temps” skribis, ke ĉiuj konataj dokumentoj pravigis la artikolon 231 kaj ke Germanujo sole pretigis, volis kaj je la dezirita momento senkatenigis la militon!

En la Sorbonne mem oni instruas nuntempe alian saĝecon ol tiun de la Quai d'Orsay!

En Anglujo almenaŭ la ŝtatistoj adaptis jam delonge siajn opiniojn al tiuj de la historia scienco.

Lloyd George jam rekonis en 1920 :

---

(\*) Das Ausland urteilt. Amerikaner, Engländer, Franzosen, Italiener, Japaner, Russen, Neutrale gegen das Versailler Urteil herausgegeben von Alfred von Wegerer. — Verlag Georg Stilke. Berlin, 1929.

„Ju pli oni legas la memorskribaĵojn kaj librojn, kiuj estis skribataj en la diversaj landoj pri tio kio okazis antaŭ la 1a. de Aŭgusto 1914, despli oni konvinkiĝas, ke neniu ŝtatestro deziris la militon je tiu momento. Estis io en kion ili englitis, aŭ pli bone renversfalis, eble pro malsaĝeco, kaj diskuto estus sendube foriginta ĝin”.

La nunaj ministroj Mac Donald, Lord Parmoor, Ponsonby, diras ĝin ĉiuj same klare : neniu popolo **SOLE** estas respondeca pri la lasta milito.

Ĉu ĝi eble estis evitebla ? Lloyd George kaj Smuts opinias, ke se la nacioj estus provintaj renkonti sin en „a round table conference”, kunveno ĉirkaŭ la verda tablo, la granda katastrofo estus estinta evitota.

Estas tipa inspiro de tio, kion oni nomas ĉe la Anglo-Saksoj kaj la popoloj kiuj estas estintaj en ilia politika lernejo, la „Committee-sense”, tiu emo por babilantaj kunvenoj, la fonto de la parlamentarismo ! Oni povas pensi pri ĉi tio, kion oni deziras, sed sendube estas estinta en 1914 tragika fino de okazintaĵoj.

Tiel ĝin klarigis al ni Prof. Gooch, kun kiu ni havis antaŭ nelonge en Londono la grandan honoron kaj la neforgeseblan plezuron babili pri tiu de li tiel pristudita temo :

„Grey ne povis agi alimaniere, tiel li klarigis al ni, kaj ju pli mi absorbiĝas en la studo de la dokumentoj de la Foreign Office, kie mi nun estas ĉiun matenon de mia vivo, despli mi konvinkiĝas, ke li neniel gvidigis sin per kontraŭ-Germanaj sentoj.

„Tio estas la tragedia flanko de tiu okazintaĵo, daŭrigis la Brita historiisto : en Anglujo, Lord Grey registarestro, Anglo kore kaj anime, nek germanema nek kontraŭ-germana, sed deziranta interkonsenton kun Germanujo. Li devis akcepti la heredaĵon de Landsdowne, post la malsukceso, pro tiom pli aŭ malpli kompreneblaj kialoj, de Angla-Germana interkonsento.

„Kun Bulow oni tiutempe neniam tiel bone povis trakti en Londono, kaj oni estis ĉiam konsiderinta lin kiel ne tute „safe”.

„Sed nun, kiam li estis for de la scenejo en Berlino, kaj kun Bethmann kaj Jagow, ambaŭ sincere celantaj interkonsenton kun Anglujo, la cirkonstancoj, koncerne la personaj faktoroj, estis ja pli favoraj ol malfavoraj por interkonsento.

„Gigantaj eraroj estas faritaj de la Germana diplomatio ĉirkaŭ la jarcentŝanĝo, sed en 1914 ĉiuj ŝtatestoj en Berlino kaj en Londono, Bethmann kaj von Jagow, kaj Lord Grey, ili ne deziris la militon !

„Kaj tamen ĝi eksplodis !”

— Anagke, la Greka fatalo, ni interrompis la grandan klerulon.

— May be, may be. — Eble, eble, ĉiukaze io kio tre similis al ĝi”.

H. V.

# For la militarismo!



Nur la metiaj militistoj, nur la armil-fabrikantoj kaj milit-profitantoj deziras militon! Sur la kadavroj de la filoj de l'popolo ili volas plialtrangiĝi, ili volas pliriĉigi sin!

## Esperanto kaj Pacifismo.

Estis precipe pro la paco inter la popoloj, ke D-ro Zamenhof konstruis kaj propagandis Esperanton. Estas do ankaŭ ne mirige, ke Esperanto trovas en pacifistaj mezoj siajn plej diligentajn anojn.

Dum la lasta internacia kongreso de la „War Resisters' International”-nederlande” Internationale van Krijgsdienst-weigeraars”, esperante „Internacalo de Kontraŭmilitistoj” I. K. M. — kiu okazis en Julio 1928 sur la „Sonntagsberg” en Aŭstrujo, ĉiuj paroladoj, komunikoj, anoncoj, k. t. p. estis tradukataj en Esperanto kaj multaj kongresistoj kapablis komprenigi sin per Esperanto de samcelano de alia lando, kies lingvo ili ne konis. Tiel Esperanto iĝis vera ligilo inter diversaj deligitoj, kiuj sen tiu helplingvo, ne estus komprenintaj unu la alian.

Estis ĉe tiu kongreso 150 deligitoj el 18 landoj el 4 mondpartoj. La I. K. M. estas ja tre forta organizacio, kiu havas sekciojn en 43 landoj kun pli ol duona miliono da membroj.

Jen la principoj de I. K. M. : „La milito estas krimo kontraŭ la homaro. Pro tiu kialo ni estas decidintaj partopreni neniun militon kaj lukti por la forigo de ĉiuj ĝiaj kaŭzoj”.

La I. K. M. estis fondita en Bilthoven (Holando) en 1921 de kelkaj homoj el Anglujo, Nederlando, Aŭstrujo kaj Germanujo, kiuj reprezentis kelkajn izolajn grupetojn da militrifuzintoj. En 1923 la I. K. M. estis reorganizita kaj la sidejo estis translokita al Anglujo. La I. K. M. ne kreis kontraŭmilitan movadon ; ĝi ja estas la trovinto kaj kuniginto de multaj jam ekzistintaj kontraŭmilitaj grupoj, kiuj aliĝis al la radikala vidpunkto : partopreni neniun militon, kiel ajn.

La Kongreso de 1925 en Londono kaj tiu de 1928 en Aŭstrujo atestas pri la forta agado de la Internacalo. La dumonata bulteno de la I. K. M. estas eldonita ankaŭ en Esperanto.

En Flandrujo ekzistas la „Vlaamsche Afdeeling van I. K. M. („Flandra Sekcio de I. K. M.), kiu havas sian sidejon en Antverpeno. Ĉi tiu juna grupo daŭre akiras novajn anojn. En Julio 1928 ĝi sendis deligiton — s-ro A. Suls — al la internacia kongreso. Depost Majo 1929 ĝi eldonas propran organon „Het nieuwe Geluid” („La nova sono”), dediĉitan al la internacia pacifista movado.

Ni tre konsilas al niaj amikoj interkonatiĝi kun tiu tre interesa movado, kiu luktas por la liberigo de la homaro de la milita plago kaj certe ankaŭ por la Flandra parto de ĝi. Por ĉiuj informoj oni sin turnu al : S-ro A. Suls, Schijfwerpersstraat, 92, Antwerpen.

## GRATULOJ.

— Al S<sup>ro</sup> Jaume Grau Casas, la fama esperantista ampoeto el Katalunujo, kiu edziĝis kun Angelina Domènech, filino de la esperantista poeto. Al ambaŭ ni deziras tutkore ĉian bonon !

— Al nia samideano Bolssens, el Sankta Nikolao, kaj lia estimata edzino, al kiuj naskiĝis filineto Agnès.

## Kiun lingvon paroladis Nia Sinjoro Jesu-Kristo ?

En liturgiaj traktaĵoj oni legas, ke estas nesciate, ĉu Jesu-Kristo por fari la sanktan Eŭkaristion uzis la nacian siro-ĥaldean (aramean) lingvon aŭ la antikvan hebrean (biblian) lingvon. Sed estas konstatite, ke la liturgio de post la apostolaj tempoj estis solenata en diversaj lingvoj, ordinare en la lingvo, kiun la popolo paroladis aŭ almenaŭ komprenadis. La ĉefaj kaj plej disvastigitaj estis la tri surkrucaj lingvoj : la siro-ĥaldea (aramea), la greka kaj la latina.

Antaŭ nelonge la fame konata Viena lingvisto kaj esploristo, D-ro C. Wessely, paroladis al la Leono-Societo en Wien (Aŭstrujo) pri la fremdlingvaj vortoj kaj frazoj, kiujn cikatromarkigita virgulino Teresia Neumann, en Konnersreuth (Bavarujo), ekparolis dum kelkaj el ŝiaj ekstazoj. Li diris, ke tiuj fremdlingvaj vortoj, ekzemple : *Salabu... Jehudaje* = Krucumu... Judoj! — *Ma hada?* = Kio estas tio? — *äs-ĉe* = soifo ; — *Abba schabok lähon* = Patro, pardonu al ili — estas sendube arameaj vortoj, vere tiaj kiaj estis parolataj en la tempo de Kristo, kaj konkludis, ke *Jesu-Kristo kaj liaj ĉirkaŭantoj kutime uzadis la aramean lingvon*, ne la hebrean aŭ grekan.

La samon asertas Pastro Henry Josef, karmela monaĥo, en Pulinkunno (Suda Hindujo), en mallonga traktaĵo pri la ĥaldea liturgio, kiun mi ricevis de li ĝuste je la tago, kiam en la Viena gazeto *Reichspost* (27 januaro 1929, n° 27) publikita estis artikolo de D-ro C. Wessely, titolita : „Aramee en Konnersreuth ! Lingvaj surprizaĵoj de Teresia Neumann ! Io ne-aŭdita, neniam okazinta !”

La Pastro skribis : „La ĥaldea liturgio kaj la lingvo samnoma devenas de la apostolo epoko. Laŭ kelkaj historiistoj la ĥaldea lingvo estas tiomaĝa, kiomaĝa estas la homa gento mem. *Estas fakto nerefutebla, ke Nia Sinjoro Jesu-Kristo, lia virga patrino kaj la apostoloj paroladis la ĥaldean lingvon*, kiu nuntempe estas la liturgia lingvo de la katolikoj en Mezopotamio kaj Persujo, kaj de la S. Tomas-kristanoj de Malabar”.

Tuj mi sendis liston de la fremdlingvaj vortoj parolitaj de Teresia Neuman al Pastro Henry Josef, kun la peto, ke li bonvolu trarigardi ĝin kaj sciigi al mi sian opinion. Responde Pastro Henry Josef skribis al mi : „Nek spertulo, nek lertulo mi estas. Tial mi sendis ilin (la vortojn) al maljunaj lingvistaj pastroj en aliaj monaĥejoj ; ankaŭ mi konsultis la maljunulojn ĉi tie kaj atendis iliajn opiniojn. La rezultatojn mi fine alsendas... Via letero estis tre interesa al ĉiuj pastroj, ĉar ĝi enhavis la ĥaldean lingvan parolon de la virgulino pia Teresia Neumann. Ĉiuj pastroj unuane opinias, ke *la virgulino pia parolas ĥaldee sendube. Nia Sinjoro Jesu-Kristo honoras sian lingvon ankaŭ*”. Tiu respondo pravigas D-ron C. Wessely asertantan, ke Jesu-Kristo kaj liaj ĉirkaŭan-



toj kutime uzadis la aramean lingvon, t. e. la siro ĥaldean idiomon, kiun la Judoj post ilia reveno el la Babilona malliberigo en Palestinon daŭrigis uzadi apud la hebrea lingvo. En la tempo de Jesuo ili kutime paroladis ĥaldee.

Francisko Meŝtan, *presbitero*.

(El „*Espero Katolika*”).



## Flandra Kanto Esperantigita

### EDEN - HEJMO.

*Teksto de René De Clercq.*

*Muziko de Émiel Hullebroeck.*

Tra dom' mia  
Ludas sunradi'.  
Reĝon en la devo  
Nun min sentas mi :  
Mian familion  
Laŭ la vivovoj',  
Sur la brakoj portas  
Mi kun ĝoj'.

Sola kruco  
Staras sur kamen'.  
Edzinet' anĝelo,  
Hejm' estu eden'.  
Estu ja konsolo  
Kaj mia fier',  
Freŝaj vivofloroj  
Sur la ter'.

Ho, infanoj!  
Ĝojo en malriĉ' !  
Ĉu je granda ŝarĝo,  
Malpli da feliĉ' ?  
Ĉu oni malsatus  
Pro buŝeto pli ?  
Kie homoj luktas  
Helpas Di' !

Tradukis *Jan van Schoor*.

### SIMILA AL ĈERIZO.

Simila al ĉerizo  
Ĝi estas via buŝ',  
Al suna paradizo  
Min portus unu tuŝ' !

Ripozu mia kapo  
Ĉe via juna sin',  
Per dolĉa vangofrapo  
Vi feliĉigu min.

El viaj oraj haroj  
Ligilon plektu vi,  
Ĝi estu mil'da jaroj  
La ĉeno inter ni.

Okuloj viaj ĉarmaj  
Parolas pri promes',  
Ke vi kun ĝojolarmoj  
Responde diros : Jes.

*Adriaan Kloek.*

## Vortfarado kaj popola Edukado.

Estis kaj ankoraŭ estas homoj, kiuj ne povas akcepti, ke oni penadas por savi la bretonan lingvon. Unu el tiuj estis Renan. Li opiniis, ke oni devu lernigi la francan al ĉiuj Bretonoj senprokraste, „ĉar la bretona, li diris, ne havas sciencajn kaj teknikaj vortojn”.

Oni do lernigis la francan al ĉiuj Bretonoj. Pasis jaroj. La franclingva lernado fiaskis. La Bretonoj lernas la francan, sed tiel neperfekte, ke pli ol miliono da ili ne kapablas preparoli iun seriozan temon per tiu lingvo, ne kapablas legi francan libron aŭ kompreni francan prelegon.

Intertempe, kaj tute neantaŭvidite de Renan, kreigis scienca kaj teknika terminaro en la lingvo bretona.

Tiu vortaro estas pure logika. Ĝi estas memstara, t. e., kunmetita per naciaj radikoj, prefiksoj kaj sufiksoj.

Tial, ĝi estas ideala ilo por popola edukado.

Dum la franca diras *dolichocéphale*, ĝi diras *hirbennek* (longkapa); dum la franca diras *logarithme*, ĝi diras *eilniver* (helpnombro); dum la franca diras *cunéiforme*, ĝi diras *gennheñvel* (kojnforma).

La Francoj estas tute liberaj, torturi siajn cerbojn kaj tiujn de siaj idoj per nekompreneblaj, nememorigeblaj vortoj. Sed ili ne devas miri, kiam malgranda popolo, saĝa kaj soifanta pri kleriĝado, forĝas al si taŭĝan instruilon kaj rifuzas plu atenti pri ilia malhelpa, antikvamoda ilaĉo.

(El „Nord-Okcidento”)

---

## Perfiduloj.

La „Kataluna Esperantista Federacio” estis unu el la plej florantaj kaj agemaj federacioj kaj ĝia organo „Kataluna Esperantisto” estis unu el la plej interesaj esperantaj revuoj. La „Internaciaj Floraj Ludoj”, organizataj de la „K. E. F.” ĉiujare, tre influis la disvolviĝon de nia literaturo.

Antaŭ unu jaro „Kataluna Esperantisto” subite ne plu aperis, la „K. E. F.” estis disigita de la guberniestro de Barcelona kaj la „Floraj Ludoj” ne plu povis esti organizataj.

Nun oni skribis al ni, ke estas dank'al (!) la kontraŭagado kaj denuncado de S-roj Rocamora, Inglada i Ors kaj Julio Mangada, ke la „K. E. F.” devis ĉesi sian laboron kaj ke la prezidinto, S-ro Delfi Dalmau, estis persekutata.

Samideanoj ĉiulandaj, kia ajn estu via opinio pri la agado de „K.E.F.”, ĉu esperantistoj kiuj denuncas kolegojn meritas ankoraŭ la nomon de „samideanoj”? Ĉu ni tro akraj estas, kiam ni nomas ilin „perfiduloj”?

## INTER NI.

**Flandrema Grupo Esperantista, Antverpeno.** La kursoj regule estas daŭrigataj kaj la kunvenoj same regule okazas ĉiun merkredon. Dum la venonta vintro ni organizos kelkajn intimajn festojn. Jam la 28an. de septembro okazos koncerto kun dancado en la salono de „Uilenspiegel“, Diepestraat, okaze de la disdono de l' diplomoj al la lernintoj de la kursoj, gviditaj de S-roj Vermuyten kaj Van Schoor.

Kelkaj el niaj anoj ĉeestos la Nederlandan kongreson en Arnhem ; kelkaj ĉeestis la universalan kongreson en Budapest.

Pli kaj pli oni ekaltestimas en aliaj rondoĵoj enlande kaj eksterlande nian agadon ; de diversaj flankoj oni kun simpatio skribis al ni.

Dum la monato Septembro nin vizitis k-do Weiss el Hungarujo ; la antaŭa monato estis bulgara samideano kiu nin vizitis. Niaj membroj ŝatas tiajn vizitojn kaj ni esperas, ke ĉiuj fremdaj samideanoj vizitantaj Antverpenon venos pasigi kelkajn horojn en mia mezo. MART.

**El Sankta Nikolao.** — Okaze de la kvindeka datreveno de ilia edziĝo, la esperantistaro telegrafe gratulis s-on urbestron Desmedt kaj lian estimatan edzinon, kiuj kore dankis.

Dum la „Vlaamsche Kermis“ (Flandra Kermeso) de la „Katholieke Gilde“ (Katolika Gildo) la grupo kreis intereson por nia lingvo, parolante Esperanton ĉiuokaze.

Ĉar „Belga Esperantisto“ verŝajne dronis — ne plu aperis depost Majo — multaj gemembroj de la loka grupo abonis „Flandra'n Esperantisto'n“. Oni ankaŭ preparolis la fondon de „Flandrema Rondeto“.

Nova kurso okazos je l' komenco de Oktobro. Gvidanto estos s-ro Schiffer el Antverpeno, kiu jam sukcesplene gvidis kurson.

---

## Al Arnhem.

La 21an. kaj 22an. de Septembro okazos la Kvara Nederlanda Esperanto Kongreso en la bela, ĉarma urbo Arnhem.

La programo estas tre alloga : okazos parolado de s-ino Isbrücker, festkunveno, ekskurso al la plej belaj ĉirkaŭaĵoj de Arnhem, k. t. p.

Kelkaj membroj de „Flandrema Grupo Esperantista“ el Antverpeno jam decidis iri al Arnhem. Tiuj, kiuj dezirus kuniri sciigu tion al f-ino Martha Vervloet, Gravinstraat, 32, Borgerhout-Antwerpen. Samideanoj el aliaj lokoj ankaŭ povas kuniri kaj sentos sin inter amikoj.

La nuna intenco estas fari la ekskurson parte bicikle, forveturi el Arnhem marde matene al Amsterdam kaj reveni Antverpenon merkrede.

# AVINO (\*)

de Victor A. de la Montagne.

Tra l'malgrandaj fenestretoj  
enpenetras sunradio.  
Miriado da polvoj  
dancas en la sunobriilo.  
Frapetadas pendhorloĝo  
en la malmoderna ĉambro.  
Ĉe l' lulilo de la orfa  
nepo sidas la avino ;  
dolĉe ŝi kantetas flustre  
kanton de l' malnova tempo ;  
kanton, kiu ŝin mem iam  
dorlotante ekdormigis.  
Dolĉa rememoro !... Kaj jen  
bildoj el pasint' vidiĝas,  
kiujn ŝi delonge kredis  
forĝesitaj, antaŭ ŝi.  
Multaj tagoj, zorgoplenaj  
de mateno ĝis vespero,  
pene, laborante, ĝoje  
trapasitaj, heligitaj  
per la sankta, dolĉa amo :  
am' infan-, edzin-, patrina.  
Kaj leviĝas varmaj larmoj  
en l'okuloj, kiam pensas

ŝi al ĉiuj, al ŝi karaj,  
kaj nun tie, en tombejo  
poreterne, ripozantaj,  
Kaj dezir' profunda al ĉi  
ĉiuj tuŝas ŝian koron ;  
ŝajnas al ŝi, ke ŝi aŭdas  
voĉon, kiu al ŝi krias :  
ke sufiĉe, ŝi jam vivis,  
plenuminte sian taskon.  
Kaj kap' ŝia sur la bruston  
falas, kaj por pia preĝo  
ŝi kunigas siajn manojn, —  
kaj buŝ' ŝia treme flustras :  
„Di-Sinjor', mi estas preta”.

Sed en la lulil' l'infano  
vekiĝinta al ŝi krias : —  
en la brakoj ŝi ĝin prenas,  
amoplene ĝin kisante. —  
La pasinto forĝesita,  
la ĉagreno forfluginta  
estas pro la bild' de l'vivo,  
pro l' bild' freŝa de l'estonto,  
petolanta ĉe brust' ŝia.

*El la flandra tradukis : MARTHA VERVLOET.*

*(\*) Premita en la XIVaj Internaciaj Floraj Ludoj.*

## GAJA MARO

Ĉe flandra marbordo mi naĝis somere  
Brilegis la sun' en ĉiela senlim',  
Kaj ŝaŭmridetantaj ondeto mistere  
Forlavis malĝojon de mia anim'.

Meznokte mi naĝis en maro fosfora,  
Elektre ekbrilis rulanta ondar',  
Fajreraj feinoj sub luno plenglora  
Ekdancis kaj kantis la ĝojon de l'mar'.

Oostduinkerke-sur-Maró.

Julio 1929.

WILFRID M. APPLEBY.

(Pomo).

## Historio de Pluvombrelo.

Franĉjo Kwispelar estas la plej saĝa homo el la mondo kaj eble ankaŭ la plej tolerema. Kiam lia edzino Kornelio (li nomas ŝin malplilongigite : Kora), klopodis acidigi lian vivon, ankaŭ tiam Franĉjo ridetis boneme kaj pacience kaj kondukis laŭ la ordonoj de ŝia virina Moŝto.

La bonhumoro de Franĉjo nur forlasis lin, kiam je pluvema vetero, Kora lin ordonis kunporti ombrelon. Okazis je bela somera Dimanĉo, posttagmeze...

Necesas ke vi sciu, ke Franĉjo Kwispelar estas komitatano de la muziksocieto „La gajaj Muzikistoj”. Tie certe lia personeco pli valorigas ol hejme. Nu, la societo farus promenadon tiun ĉi posttagmezon, je la unua fojo dum tiu jaro. Nia heroo jam priĝojis antaŭe. Eble estas la nura eta malvirto de Franĉjo, ke li ŝategas marŝi antaŭ la muzikistoj kaj flanke de la flago. Tiam li estas fiera kiel pavo.

Do imagu dum la tuta tago la suneto brilis hele kaj gaje, Franĉjo jam frotis al si la manojn. Li vestis sin per sia edziĝvesto kaj metis sian plej bonan ĉapelon. Sed subite la sunlumo malheliĝis kaj mokantaj pluveroj dancetis sur la vitra kupolo de la manĝejo.

— Je l'diablo, blasfemis Franĉjo. Ĝuste Kore, supre en la dormoĉambro aranĝis la liton kaj spite amo kaj amikeco Franĉjo intencis foriri sen adiaŭdiro. Sed li ne estis faranta du paŝojn, kiam laŭtega voĉo ekkriis : „Franĉjo, ĉu vi jam havas pluvombrelon” ?

— „Jes”, malvigle Franĉjo respondis, kiel iu kiu respondas „jes” je l' momento kiam oni vekas lin, sed tamen kviete restas en la lito.

Sed ve! Kora konis tian respondmanieron kaj tuj ŝi aperis sur la ŝtuparon kaj ekvidas la edzon en la koridoro.

— „Vi devus honti ! Mensogi tiamaniere, ŝi ree ekkriis. Ĉu vi ne aŭdas la pluvadon ? Ĉu vi intencas difekti vian plej bonan ĉapelon kaj vian edziĝveston ?

Franĉjo diris nenion. Li ruĝiĝis kiel Hinda kokino kaj lia sango ekboleĝis ! Li paŝis nek antaŭen, nek malantaŭen.

— Vi deziras sendube, ke mi alportu la ombrelon. por plaĉi al al via Moŝto ?

— Tuj la pluvo ĉesos, balbutis Franĉjo. Estas ridinde, ke... Dume la virino malsuprensaltis la ŝtuparon.

— Difekti viajn vestaĵojn, estas pli bone, ĉu ne ?

Tamen post du minutoj la edzino jam pli kvieta pendigis ombrelon ĉe la brako de Franĉjo. La bonulo diris nenion sed interne furioza li eliris sur la straton.

Dum la unuaj kvin minutoj Franĉjo restis tiel kolera, despli ĉar tuj la suno reekbrilis... Li blasfemis almenaŭ dek fojojn. Li volis disŝiri la ombrelon.

Tamen baldaŭ li forĝesis la malamon kontraŭ frato-ombrello. Kiel kviete ĝi pendis ĉe lia brako! Kaj eĉ plezure kaj gaje li marŝis flanke de la prezidanto antaŭ „La gajaj Muzikistoj”. Li ne rimarkis, ke la muzikistoj mokis lin kaj montris la ombrelon unu al la alia.

Tamen Franĉjo ĝojis dum la tuta tago kaj vespere li ankaŭ gaje iris hejmen. Li preskaŭ estis alveninta apud sia domo, kiam ree ekpluvis. Rapide Franĉjo intencis preni sian ombrelon. Sed ve! li ektremis de timo... Kie estis la ombrello? Je l' ĉielo!... Kion diros la edzino!... Tamen Franĉjo paŝetis domen. Ŝanceliĝante li sonoretis kaj preskaŭ je l' sama momento Kora malfermis la porĉon... Pluvegis!...

— „Eniru tuj, mia Franĉjo, vokis la edzino. Estas ja tro malbone ekstere!...

Franĉjo ne komprenis. Kial ŝi ne diris ion pri la ombrello?! Kial ŝi estis tiel afabla! La vespermanĝo staris preta sur la tablo.

— „Manĝu nur, mia Franĉjo”, flustris Kora ameme kaj gvidis lin al la seĝo. „Manĝu, tiam ni poste povas enlitiĝi. Via ombrello jam pendas en la vestaĵoŝranko”.

Franĉjo kvazaŭ falis de el la ĉielo! Ĉu ne okazis miraklo!? Feliĉe, Kora ne rimarkis lian miron kaj Franĉjo juĝis prudente ne demandi klarigon, kvankam ĉio ŝajnis nekomprenebla al li.

Kio do okazis?...

Estas simplege. Kelkaj ŝercemuloj kiuj vidis alveni Franĉjon al la societejo, portanta ombrelon, kaj sciis ke la vera kaŭzo de tio estis lia edzino, forprenis la ombrelon en ia trinkejo kaj la plej kuraĝa el la aro portis ĝin al la edzino kaj diris:

— Sinjorino Kwispelar, via edzo estis tiel furioza pro la mokaĵo de siaj amikoj pri la ombrello, kaj li tiel koleriĝis, ke li freneze intencis salti en la riveron. Sed ni povis reteni lin je l' lasta momento. Tial mi reportas la ombrelon, kiu estis kaŭzo de ĉio por ke li ne plu vidu ĝin.

Kora videble tremanta, kredis ĉion kaj dankegis multfoje la savintojn de sia edzo.

Poste Franĉjo eksciis la veron, sed li kompreneble ne malsekretigis ĝin al sia edzino, kaj depost tiam Kora ne nur estas servema, afabla edzineto, sed ankaŭ ne plu devigas sian edzon kunporti ombrelon!

*Originale verkis POL VARENS.*

## Subteno por nia revuo.

*P. Glöckner, Pirna, 5.- fr.; Van H., Herenthals, 15.- fr.; J. Théry, ĉiumonate, 10.- fr.; G. Janssens, 10.- fr.; F. Eulaers, 2.- fr.; F. Wolfs, 3.30; Van Dierendonck, Heist, 10.- fr.; M. Fehr, 5.- fr.; W. C., ĉiumonate, 10.- fr.; Jan, ĉiumonate, 10.- fr.; Mart., ĉiumonate, 10.- fr. entute 90.30 fr.*

# Esperanto door Zelfonderricht.

2<sup>de</sup> LES.

## Vertalingen der 1<sup>e</sup> Les.

TRADUKO. — La patro kaj la patrino. Fratino kaj frato. La domo de la onklo. La rapida kato. Vi kaj mi estas bonaj amikoj. Sur la tablo kuŝas libro kaj krajono. La libro estas bruna kaj la krajono ruĝa. Antverpeno estas urbo kun larĝaj stratoj kaj belaj monumentoj. La amikoj de miaj amikoj estas miaj amikoj. En la vilaĝo staras altaj arboj.

VERTALING. — Het huisgezin bestaat uit de vader, de moeder en de kinderen. De vader werkt aan de haven en de moeder werkt te huis. De kinderen gaan naar de school en leeren vlijtig. 's Avonds gaan de kinderen vroeg naar bed terwijl de vader leest, rookt of praat met de echtgenote.

GESLACHT. — Het geslacht in Esperanto is het natuurlijk geslacht. Alle namen van voorwerpen en van die dieren, waarvan het geslacht niet bepaald is, zijn onzijdig.

Het TEGENOVERGESTELDE wordt aangeduid door het voorvoegsel **mal**; bona = goed, malbona = slecht; lerni = leeren; mallerni = verleeren.

VRAGENDE ZINNEN worden gevormd door het woordje **ĉu** van voor aan den zin te plaatsen. Gij schrijft = vi skribas; schrijft gij? = ĉu vi skribas? Elke vragende zin begint dus met **ĉu**, indien niet met een vragend woordje als wanneer (kiam); waar (kie); enz.

ONTKENNENDE ZINNEN worden gevormd door het ontkennend woordje **ne**. Ik geloof = mi kredas; ik geloof niet = mi ne kredas.

SAMENGESTELDE WOORDEN worden gevormd door, evenals in 't Vlaamsch, het bepalend woord eerst en laatst het grondwoord te plaatsen. Stoom = vaporo; schip = ŝipo; stoomschip = vaporŝipo; patrolando = vaderland; terpomo = aardappel.

Het VERWANTSCHAP DOOR HUWELIJK wordt aangeduid door het voorvoegsel **bo**. Bopatrino = schoonmoeder; bofilo = schoonzoon.

VEREENIGING VAN MANNELIJK EN VROUWELIJK GESLACHT wordt aangeduid door het voorvoegsel **ge**. Ouders = gepatroj; mevrouwen en mijnheeren = gesinjoroj.

De ONVOLMAAKT VERLEDEN TIJD wordt gevormd door de uitgang **is**.

De AFTAMMING wordt aangeduid door het achtervoegsel **id**. Ĉevalido = veulen; bovido = kalf; kokido = kuikentje; Izraelido = Israëliet; reĝido = prins.

VERTAAL. — Slechte menschen zingen niet. Een mensch leeft niet van brood alleen. God is goed. Wat is leven zonder liefde? Gaat gij naar het buitenland? Ja, ik hoop spoedig weêr te keeren! Uwe oogen zijn blauw; de mijne zijn grijs. Zoolang de schoonmoeder leeft is de huiselijke vrede heen! Is dat waar? Ja, maar niet altijd! Het zwanenlied van den dichter. Er is maar een land, dat mijn land kan zijn. Men mint slechts eenmaal in (dum) het leven. De politiek is geen exacte wetenschap. Een vriend is een ziel in twee lichamen. Waar is uw vaderland? Waar Maas en Schelde vloeien, de Noordzee bruist en stormt. En immer vraagt mijn harte: waar? Vaarwel! Hoop en vertrouw in (je) God.

WOORDENLIJST. — Goed = bona; mensch = homo; niet = ne; zingen = kanti; leven = vivi; van = de; brood = pano; alleen = nur; God = Dio; wat = kio; leven = vivo; zonder = sen; liefde = amo; gaan = iri; buitenland = eksterlando; ja = jes; hopen = esperi; spoedig = baldaŭ; weêrkeeren = reveni; uw = via; oog = okulo; blauw = blua; mijn = mia; grijs = griza; zoolang = tiel longe; vrede = paco; heen = for; dat = tio; waar = vera; maar = sed; altijd = ĉiam; zwaan = cigno; lied = kanto; dichter = poeto; maar = nur; dat = kiu; kunnen = povi; men = oni; een = unu; maal = fojo; exact = preciza; wetenschap = scienco; vriend = amiko; ziel = animo; twee = du; lichaam = korpo; waar = kie; Maas = Mozo; Schelde = Skeldo; vloeien = flui; Noordzee = Norda maro; bruisen = muĝi; stormen = ŝtormi; immer = ĉiam; vragen = demandi; hart = koro; vaarwel = adiaŭ; vertrouwen = fidi.

TRADUKU. — Jen estas papero kaj krajono. La hundo kuras en la ĝardeno. La ĉevalido staras en la stalo. Mia bofratino estas en la manĝoĉambro. Ĉu vi soifas? Gesinjoroj, mi parolis al vi pri la esperanta movado. La fratino de mia patrino estas mia onklinino kaj la fratino de mia edzino estas mia bofratino. Al kiu apartenas tiu libro? Ĝi apartenas al mi, sinjoro. Ĉu vi jam legis „La Leono de Flandrujo” en esperanto? La traduko estas tre bona. Ĉu vi estis en Dixmude? Ne, mi ne povis iri. Ĉu vi jam kapablas legi el nia revuo? Ne estas malfacile! Vi certe komprenas, ĉu ne?

WOORDENLIJST. — Jen = ziehier; papero = papier; krajono = potlood; = hundo = hond; ĝardeno = tuin; stari = staan; stalo = stal; mia = mijn; manĝi = eten; ĉambro = kamer; soifi = dorst hebben; paroli = spreken; al = aan; pri = over; movado = beweging; edzo = echtgenoot; kiu = wie; aparteni = behooren; tiu = dat; libro = boek; ĝi = het; sinjoro = mijnheer; jam = reeds; leono = leeuw; traduki = vertalen; povi = kunnen; iri = gaan; kapabli = bij machte zijn; el = uit; facile = gemakkelijk; certe = zeker; kompreni = verstaan; ĉu ne = is 't niet.

*De vertalingen verschijnen in het volgende nummer.*



## BIBLIOGRAFIO.

(Ni recenzas duope senditajn verkojn, unuopajn ni citas.

Ĉiu verko estas havebla ĉe „Flandra Esperanto-Instituto”)

**Unua legolibro de Instruisto Taubmann**, ŝtate ekzamenita Esperanto-instruisto ; redaktoro de „Marto”. Ĉi tiu Esperanto-Krestomatio, la n° 3 de la Esperanto-Biblioteko de „Marto”, estas tre bone uzebla por kursoj laŭ parola metodo kaj estas rekomendita de Esperantista Literatura Asocio. Oni mendu ĝin ĉe la Eldonejo „Marto”, Habakladrau, Bohemujo. Prezo : 6 ĉeĥaj kronoj.

**Gvidfolio de Dordrecht (Nederlando)**, eldonita de la Asocio por Fremdul-Turismo en Dordrecht. Tre zorge presita kaj ornamita per belaj bildoj de la ĉarma, pentrinda holanda urbo estas ĉi tiu gvidfolio, kiu krom tio enhavas planon de Dordrecht. Turistoj mendu ĝin ĉe la supre citita adreso.

**Oficiala Bulteno de la Esperantista Akademio**, kajero I, Junio 1929. Prezo : 1 sv. fr.

**Jarlibro de la Lingva Komitato kaj de ĝia Akademio, 1929.** - Esperantista Centra Librejo, 51, rue de Clichy, Paris 9<sup>e</sup>. Prezo : 3 fr. frankoj.

### RICEVITAJ REVUOJ.

Espero Katolika n° 62, 63 ; Oomoto Internacia n° 32a, Internacia Medicina Revuo n° 1, 2, 3, 4 ; Lingvo Internacia n° 1 ; The British Esperantist n° 292 ; International Language n° 6 ; Breiz Atao n° 59, 60, 61, 62 ; Nord-Okcidento, n° 1, 2 ; Holanda Esperantisto, n° 88 ; kun ampleksa recenzo pri „Flandra Esperantisto”, n° 89 ; Laborista Esperantisto, n° 9 ; Sennaciulo n° 252 ; Ondo de Daŭgava, 7.

### LIVERSAĴOJ.

— La poemo „*Katalunoj*”, kiu aperis en nia antaŭa numero, estas muzikigita de nia juna samideano Antoni Valls Roviralta el Ripollet-Barcelona. Estas tre bela kanto, je marŝtakto, kiu, se ĝi estus presita, certe estus lernata de ĉiu kantema esperantis.o.

— La sama komponisto estas muzikiginta jam „*Vundita estas mia kor*” de la sama aŭtoro.

---

La artikoloj *La Flandroj ĉe la Internacia Blindulkongreso en Vieno* kaj *Sub la libera ĉielo*, la impresoj el Oostduinkerke de Jan, nur povas pro manko de loko aperi en la sekvonta numero.

---

## Flandra Esperanto Instituto

Gravinstraat, 32

BORGERHOUT-ANTWERPEN

Poŝtĉekkonto 2427.03

Presado - Eldonado - Librovendado

Propagando - Instruado.

Petu niajn prezojn !

ESPERANTISTEN !  
BLINDENVRIENDEN !

ABONNEERT U

op het maandblad van het

**Algemeen Blindenverbond**  
van Vlaanderen

29, Rijselsche baan, Antwerpen-West

Jaarlijksche bijdrage : 10, 30 of 100 frank.

Postcheck 1°5.224.

Helpt daadwerkelijk de  
Vlaamsche blinden.

Ĉiu poeziema esperanto devas posedi la belegan poemaron

### AMO KAJ POEZIO

de Jan van Schoor

La prezo estas nur 2 belgoj (sendkostoj enkalkulitaj).

De la libro, pri kiu oni en diversaj esperantaj revuoj parolis kun grandega laŭdo, estas nur kelkaj ekzempleroj ankoraŭ haveblaj.

Do rapidu kaj mendu ĝin ĉe „Flandra Esperantisto” aŭ ĉe „Flandra Esperanto-Instituto”.

La 1an. de Oktobro aperos

### Kantaro Esperantista

La kantaro enhavas pli ol 100 kantojn, kolektitaj de Juul Karnas kaj ĝin devas posedi ĉiu kantema samideano!

Ĉiu grupo aĉetigu la kantlibron de siaj membroj por agrabligi la kunvenojn.

La prezo estas 5 frankoj, por tiuj kiuj mendos la kantaron antaŭ la 1a. de Oktobro.

Eldono de „LA NOVA BIBLIOTEKO”

ĉe H. Van der Mast,

Vlagstraat, 9, Antwerpen.

(Poŝtĉeko 209852).

## Algemeen Vlaamsch Huis

„MALPERTUUS”

S. POT - HANSEN

Frankrijklei, 8 - Antwerpen.

Bekend voor zijn extra dranken

o. m. Dortmunder, Spatenbräu,

Leeuwenbier.

Goed koud buffet      Goede bediening.

Kunvenejo de l'Esperantistoj.

## HUIS DE LEY

Driekoningenstraat. 43, Berchem.

## De Ley & Verschueren

CITÉ

N<sup>rs</sup> 143-144-145-146-147-179-180-

208-209

Groote keus in Vrouw- Manstoffen

Zijde, Fluweel en Voeding.